
世間虚仮唯仏是真

La mondo estas falsa, la Budho sola estas vera

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

「世間は虚仮にして、唯仏のみ是れ真なり」とは聖徳太子の言葉として伝えられています。

「世間は虚仮である」とは、世間そのものを否定するのではなく、相対化するあるいは超越することをいいます。およそ宗教であれば、聖と俗との緊張関係が常に問題となります。俗とは、物質的な生活—働く、稼ぐ、食べる、遊ぶ、など—です。それは虚仮だから否定されなければならない、という態度を政治家であった聖徳太子がとったはずはありません。釈尊も俗を否定したのではなく、それを超越する道を説かれたのです。それを出世間道といいます。

俗を支えているのは人間の欲望です。おいしいものが食べたい、健康でありたい、試験に合格したい、そういう欲望、即ち煩惱にどっぷり漬かって生きているのが私たちです。もしそれらを完全に否定するとすれば、社会は成り立ちませんし、人間が生きていくこと自体不可能になります。アビダルマ仏教で主張されたような煩惱の滅は分かりやすいようでいて、実現不可能なのです。

しかしだからといって、煩惱を全面肯定したのでは宗教は成り立ちません。もっとも、身の回りには煩惱にたいする自己反省をぬきにして諸願成就、除災招福をうたう宗教があふれています。じつに嘆かわしいことです。煩惱の完全否定で

"La mondo estas falsa, la Budho sola estas vera," estas la vorto de la princo Ŝootoku.

"La mondo estas falsa"; tio ĉi ne signifas nei la mondon sed relativigi aŭ transcendi ĝin. Ĝenerale ĉiu religio ĉiam temas pri streĉa rilato inter sankteco kaj sekulareco, kiu estas materia vivo - labori, mongajni, manĝi, ludi k.t.p. Ne povas esti, ke la princo Ŝootoku estante politikisto opiniis, ke falsa sekulareco estas neniigenda. Ankaŭ Ŝakja-munio ne neis ĝin sed predikis la vojon, kiu transcendas ĝin.

Sekularecon subtenas homaj deziroj, ekzemple al bongustaĵo, sano, sukceso en ekzameno k.t.p. Ni ĉiuj mergiĝas en tiaj deziro aŭ kleŝoj. Se ili estus neniigitaj, la socio ne povus ekzisti kaj la homo ne povus vivi. Neniigo de kleŝo, kiu estis asertita de la abidarma budhismo, estas facile komprenebla, sed ĝi estas neniam realigebla.

Sed se oni diras, ke kleŝo estas tute aprobinda, religio ne estas necesa, kvankam efektive ĉirkaŭ ni abundas tiaj pseŭd-religioj, kiuj fanfaronas pri plenumo de deziroj aŭ pri forigo de malfeliĉo kaj invito de feliĉo; estas vere priplorinde. Nek al plena aprobo

もなく完全肯定でもない道があるとすれば、煩惱具足という我が身の事実を如実に知見する以外にはありません。まず己を知ることです。

その上で、俗世間のあり方を相対化して見るのが仏教者のとるべき態度でしょう。すなわち、世間のいかなる考え方も絶対に正しいことはありません。そのように見極めれば、いかなる権威にも屈しないという生活、真に自由なふるまいやゆとりが可能になります。常に世間の目を気にして自分の行動を自分で束縛するという愚かさからも解放されるでしょう。

その意味では、当の聖徳太子が「承詔必謹」といっているのは矛盾です。少し前の日本人は天皇を絶対に神聖な存在として神として崇めていました。これは世間虚仮という視点を欠いていたからにほかなりません。その結果の悲劇は御存知の通りです。

仏教者の生活スタイルは、上からの道徳の押し付けを拒否するものでもあります。「死生尚ほ且つ憂ふるに足らず、如何にいわんや之より而下なる事項においてをや。追放可なり。獄牢甘んずべし。誹謗擯斥許多の陵辱あに意に介すべきものあらんや」（清沢満之）であります。

そのように言い切れる根拠が唯仏是真なのです。それはもちろん、仏教だけが正しくて他の宗教は間違っている、という意味ではなく、キリスト教徒ならば「神だけが正義」でいいのです。要するに、世俗的な価値観に縛られないで自由に生きるためには、扇の要のような根拠が必要で、仏教者にとっては仏のみに帰依することがそれにあたるのです。

nek al tuta malaprobo de kleŝo, sed al la meza vojo ni devas iri, vidante la memon plenan de kleŝoj tiel, kiel ĝi efektive estas. Unue konu min mem.

Surbaze de tio, por budhano estas necese relativigi la sekularan mondon. Neniu ideo estas absolute prava. Tion ĉi klare travidante, ni povas vivi sen subiĝo al ĉiu aŭtoritatulo, realigi vere liberan kaj trankvilan sintenadon, kaj liberigi vin el tia stultaĵo, ke ni katenas nian agadon ĉiam timante ĉirkaŭan taksadon.

Tiusence estas kontraŭdiro, ke la princo mem diris, "Vi nepre obeu la ordonojn de tennoo." Antaŭ kelka tempo japanoj adoris tennoon, tiam imperiestron, kiel la absolute sanktan dion. Tio ĉi devenis de manko de la vidpunkto ke la mondo estas falsa. Vi ja scias la konsekvencon tragedion.

La vivstilo de budhano rifuzas desupran altrudon de moralo. Kiyozawa Mansi diris, "Mi ne zorgas eĉ pri morto kaj vivo, des malpli pri ceteraj aferoj. Forpelo bone. Areston akceptas mi. Kalumnio, eksigo kaj ofendo ne estas zorgindaj."

La bazo de tiu deklaro estas "La Budho sola estas vera." Tio ne signifas ke budhismo sola estas vera kaj aliaj religioj estas malveraj" Por kristano "la Dio sola estas justa," kaj tiel estas bone. Por vivi libere ne katenate de sekulara valoro, estas necesa la centra bazo, kiu por budhano estas rifuĝo nur al budho.